n-ro 80

aprilo 2003

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## La legantoj demandas - La estraro respondas

Laŭ sugesto de estrarano ni lanĉos novan rubrikon: membroj kiuj havas iun demandon pri komerco aŭ ekonomio sendu ĝin al la redak-toro. Li mem esploros aŭ informpetos ĉe aliaj membroj por trovi taŭgan respondon.

## IKEF-kunveno dum Universala Kongreso

Laŭ la 'dua bulteno', la IKEF-kunveno estas planita je mardo, 29 julio 2003 (horo ne indikita). Kiel pasintjare, raportoj pri la kongreso ĉiutage estos legeblaj je www.uea.org.

## Enhavo

Administrado - Raporto pri la agado . . . 3-7
Financa raporto . . . 7-9
Novaj adresoj - Novaj membroj . . . 10
Mortis Gilbert Ledon - Subtena Fondaĵo . . . 10
Kunsidraporto pri KKR (Kongo) . . . 11
Komercaj petoj kaj proponoj . . . 12-15
Ĝangalo - Vikipedio . . . 15

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; Prof. Ooba Atsua; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: roland.rotsaert(a)pandora.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**:

- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), telefono +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12,

retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ http://users.pandora.be/ikef/



**Administrado - Grava atentigo al niaj membroj:**

1. La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 2002 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

2. La estraro prezentas sur la paĝoj 7-9 la financan raporton de IKEF por la jaro 2002, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.

3. La estraro notas la sumon de financa neta malgajno de 287,59 EUR kaj proponas deprenon de tiu malgajno de la kapitalo.

4. La estraranoj s-roj François Xavier GILBERT (IKEF 14), KÖNYVES Zoltán (IKEF 77), Profesoro OOBA Atsuo (IKEF 75) kaj Roland ROTSAERT (IKEF 3), ĉiuj elektitaj en 2001 dum la UK en Zagrebo, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la Statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ĉiuj pretas denove kandidatiĝi. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de ili.

5. Nia Statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la raportoj pri agado kaj financo. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo, Svedio. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu erojn 1 – 3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu eron 4 supre) okazos tie. Membroj kiuj ne povas veni al Gotenburgo, rajtas skribe komisii alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tian agon la estraro rekomendas. La precizan daton, horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos en venonta 'La Merkato' n-ro 81 komence de julio 2003.

La Estraro de IKEF

**Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2002**

Membronombro falis je la unua fojo

Je la unua fojo en la historio de IKEF falis la membronombro, nome de 145 fine de 2001 al 138 fine de 2002. En 2002 aliĝis nur 5 novaj membroj dum ni perdis 12 membrojn [2 pro morto (Franz Schneider kaj Lawrence Mee), 3 pro persona eksiĝo kaj 7 pro eksigo fare de la estraro pro nepago de kotizo]. Nia plano por plinombrigo de la

membroj al 200 – laŭ la moto 'ĉiu membro varbu novan' – bedaŭrinde ne realiĝis. La 138 membroj venas el 41 landoj, inter ili 18 el Germanio, 14 el Ĉinio, 14 el Francio, 11 el Belgio, landoj kun la plej alta nombro. Inter ĉiuj troviĝas 7 dumvivaj. La nombro de perantoj restis je 7.

La alvoko pri 'patrona membreco', t.e. financa kontribuo al kotizhelpa fonduso por interesataj membroj en malpli bonfartaj landoj, efikis. Dum la lastaj monatoj de 2002 alvenis pluraj kontribuoj por tiu fonduso. Per tio ni esperas gajni novajn membrojn kaj helpi iom al la evoluo de IKEF ankaŭ en tiaj landoj.

'La Merkato' regule aperis

Ankaŭ dum 2002 nia interkomunikilo 'La Merkato' regule kaj tre akurate aperis kvarfoje. Por gajni pli proksiman kontakton inter membroj kaj estraro, ni establos en 'La Merkato', laŭ propono de nia estrarano KÖNYVES Zoltán (IKEF 77), specialan rubrikon 'La legantoj demandas – La estraro respondas'.

Terminara Sekcio denove prezentis rimarkindan verkon

Laŭplane nia Terminara Sekcio sukcesis denove esperantigi eldonaĵon de ICC (Internacia Ĉambro pri Komerco en Parizo), nome 'Uniform Customs and Practice for Documentary Credits, UPC 500' (Esperante: Unuformaj Kutimoj kaj Praktiko por Dokumentaj Kreditoj). En la traduklaboro inkluzive reviziado partoprenis sub respondeca kunordigo de s-ro YAMASAKI Seiko (IKEF 43) kvin aliaj IKEF-membroj. La profesiece aspektanta broŝuro estis prezentata dum la Universala Kongreso en Fortaleza, Brazilo. En 'La Merkato' n-ro 77 sur paĝo 8-9 aperis konciza priskribo de Roland ROTSAERT pri rolo, celo kaj funkcio de dokumentaj kreditoj.

Ĉiu IKEF-membro paginta sian kotizon seninterrompe dum 5 jaroj, aŭtomate ricevis senpage la broŝuron. Aliaj membroj povas post- aŭ antaŭpagi al sume 5 kontinuaj jarkotizoj por same senpage ricevi la broŝuron. Ili sin turnu tiucele al la kasisto Roland ROTSAERT.

Verka agado restas sur simila nivelo

La verka agado, kiu okazas precipe en 'Monato', internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, dum 2002 iom falis, laŭ nombro de kontribuoj kaj laŭ la nombro de verkantaj IKEF-membroj (7; en la antaŭa jaro 8). Jen la 7 aŭtoroj: S-roj Per HAGEMANN (IKEF 5, nove), Gilbert René LEDON (IKEF 177), MENDL Josef (IKEF 303, nove), MU Binghua (IKEF 213), Jiri PATERA (IKEF 276), Paul PEERAERTS (IKEF 65, nove), Roland ROTSAERT (IKEF 3). Per 11 kontribuoj, Roland ROTSAERT liveris preskaŭ trionon.



Ankoraŭ ni devas konstati, ke por grandaj mondopartoj ne estas kunlaborantoj por 'Monato', kvankam loĝas tie IKEF-anoj. Kiu havas talenton por verkado, tiu anoncu sin al 'Monato' kiel verkanto (= pagata laboro). Ĉe tiu okazo, ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke 'Monato' rolas kiel ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de ĝi. Enhavo, aspekto kaj cetera kvalito de tiu magazino lastatempe daŭre kaj profesiece pliboniĝis.

Plie aperis en nia interkomunikilo 'La Merkato' kelkaj artikoloj pri ekonomiaj temoj, i.a. aparte menciinda 'Ĉehio: Per librotenado pli proksime al Eŭropo' de Jiri PATERA (IKEF 276).

Kongresaj aranĝoj

Dum la 85-a UK en Fortaleza, Brazilo, okazis je 5 aŭgusto 2002 informkunveno de IKEF kun 25 ĉeestantaj personoj, duone membroj, duone interesitoj. Prezidanto BRAUN kun estrarano profesoro OOBA raportis pri la historio de IKEF ekde ĝia fondo en la jaro 1985, ĝiaj atingaĵoj kaj aktualaj agadoj. Ĉefa kaj ĝenerala celo de IKEF estas la akceptigo kaj disvastigo de Esperanto sur la kampoj komerco, ekonomio kaj ekonomiko per praktika uzo de la lingvo.

Multe diskutata estis la instigo kaj subteno de komerco per Esperanto inter esperantistaj komercistoj, nuntempe helpata de pluraj retpaĝaroj. Ĉar en la komerco de tutmondigitaj grandentreprenoj, kie regas la angla, Esperanto aktuale ne havas ŝancojn, ni koncentru nin al niĉoj ĉe mez- kaj malgrandaj entreprenoj kaj al mondopartoj kie la angla ne ludas tian rolon.

Tre interesa kaj informriĉa estis la vizito de 14-persona grupo de IKEF-anoj je 8 aŭgusto 2002 ĉe SEBRAE-CE en Fortaleza. Temas pri instituto por disvolvigo de la ekonomio de la ŝtato Ceará, de kiu Fortaleza estas ĉefurbo. Fakestrino s-ino Marta Campelo kun kvar pliaj kunlaborantoj prezentis al ni la taskojn de la diversaj subinstitutoj. Ĉefa celo: plialtigi produktadon kaj eksporton de la ŝtato Ceará. La interpretadon portugala/Esperanto bonege faris nia brazila membro s-ro Silvio KNIESS MATES (IKEF 250). Fine la vizitantoj estis invitataj al komuna tagmanĝo en restoracio, kie ili estis regalataj per manĝaĵoj senescepte el la frukto akaĵuo.

Krom la aranĝoj en Fortaleza partoprenis IKEF-anoj en la OSIEK-konferenco fine de

julio en Leuven, Belgio, kaj fine de aŭgusto en la Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Verona, Italio. Ĉe tio okazis multaj neformalaj kontaktoj inter la membroj.

Komercado inter komercistoj esperantistaj

En ĉiu numero de 'La Merkato' aperis anoncoj pri komercaj petoj kaj proponoj. Ni aperigas ilin senpage. La nombro en 2002 je 28 plialtiĝis (2001: 23, 2000: 21). Samtempe ili aperas en la rubriko 'Komercaj Anoncoj' de nia retpaĝaro www.ikef.org.

Instigon al komercado per Esperanto donas ankaŭ la retlisto per-esperanto-komerco(a)yahoogroups.com kaj la retejo www.komerco.com de nia ĉina peranto kaj estrarano WANG Tianyi (IKEF 117). Per tio kiel ankaŭ per retpoŝto la komunikado inter la komercistoj bone funkcias. Aparte niaj ĉinaj membroj multe komercas kaj komunikas kun afrikaj kaj sudamerikaj samideanoj.

Praktikaj agadoj

Lastjare ni raportis pri la intervjuo kiun faris nia estrarano d-ro Rainer KURZ (IKEF 235) kun la Nobel-premiito profesoro Reinhard SELTEN, Germanio. Intertempe la videobendoj estas finproduktitaj. IKEF pro sia financa kontribuo al tiu afero ricevis propran ekzempleron, kiu rondiras al niaj membroj. Kiu volas – senkoste – pruntepreni ĝin, turnu sin al prezidanto BRAUN, kiu administras la disdonon.

Pri tiu intervjuo verkis nia membro inĝeniero Kees RUIG (IKEF 68) recenzon, kiu sonas tre pozitive (vidu en 'La Merkato', n-ro 79, paĝo 8-9) kaj kiu ankaŭ estis transprenita de aliaj E-revuoj.

La sama s-ro Ruig realigis alian ideon. Li tradukis parton de la komercaj petoj kaj proponoj – se ili ŝajnas esti seriozaj al li – en la nederlandan lingvon kaj aperigis ilin en la speciala komercpeta bulteno ‘Handelsbemiddeling’ de la nederlandaj Ĉambroj de Komerco (ĈdK). Per ĉi tiu iniciativo li povis atingi, ke la ĈdK kaj la nacia industrio kaj komerco malkovras la - ankoraŭ modestan - rolon kiun la internacia lingvo povas ludi, kaj la valoron de IKEF tiurilate.

Alvokojn al la esperantistaj komercistoj pri honesta kaj fidinda agado en la komerco faris nia membro s-ro Chen jinyin (IKEF 302). La saman temon traktis s-ro Bummi OSHO-DAVIES eĉ per poemo (vidu je ‘La Merkato’ n-ro 77).

Nia ĉina peranto kaj estrarano WANG Tianyi eldonas monatan revuon EA (Esperanto



Aktivas) por mil ĉinaj Esperantistoj. Sur 12 paĝoj li dissendas novaĵojn kaj komercajn anoncojn, precipe de IKEF kaj de IKEF-anoj.

Nia membro Janek BENDER (IKEF 298) sukcesis oferti en sia firmaego ROBERT BOSCH GMBH, ĉefsidejo Stuttgart, Germanio, Esperanto-kurseton por dungitoj, kiun li efektivigis kun asisto de estrarano d-ro Rainer KURZ por 14 personoj.

Resumo

Se oni komparas la diversajn erojn de ĉi tiu raporto inkluzive la financan raporton, montriĝas salde certa stagnado. Necesas nova instigo al la membraro por gajni pliajn membrojn kaj al pli aktiva agado. La Laborplano akceptita en 1998 dum la Ĝenerala Kunveno en Montpeliero (valida 1998 – 2003) finiĝos ĉi-jare. Nova laborplano adaptota al la nunaj cirkonstancoj estas necesa kaj devas esti ellaborota dum 2003.

Por la Estraro: Franz Josef BRAUN, Prezidanto

## Financa raporto pri la jaro 2002

(spezokonto kaj bilanco troviĝas sur la mezaj paĝoj de ĉi tiu revuo)

La ciferoj montras malprofiton je 287,59 EUR. Tio ŝajnas kontentiga rezulto, ĉar dum 2002 IKEF elspezis 961,74 EUR por la traduko kaj disponigo al la membroj de la ICC-broŝuro pri dokumentaj kreditoj. Tamen, grandaj projektoj ne tuj eblos; unue necesos denove plifortigi la kapitalon.

Jen kelkaj klarigoj pri la eroj:

- Elspezoj terminologia laboro: la kompleta kosto de la menciita ICC-broŝuro. Eta parto revenis je 'vendo eldonoj'. Restas plurdekaj ekzempleroj de la nun kaj dum la antaŭaj jaroj eldonitaj broŝuroj, sed la vendoj okazas nur etkvante.

- Kostoj de 'La Merkato': konsiderinde malpli, i.a. ĉar en 2002 ni rezignis pri la tradicia foto-paĝoj post la UK kaj ĉar la eldonkvanto estis iom malpli (ĉ. 250 anstataŭ 300 ekz.).

- La konto 'Maklerajô pro anoncoj Monato' denove havas nulan saldon, kvankam tiaj anoncoj povus esti konsiderinda enspezfonto kaj por IKEF, kaj por Monato.

- En la transira konto estas la sumo de malfrue farita fakturo. Temas pri ĉefa parto de la kostoj de La Merkato kaj pri la sendkostoj de la broŝuro 'dokumentaj kreditoj'.

Roland ROTSAERT, financa konsilanto

## Donacoj



La kasisto dankas pro la donacoj de IKEF-membroj Bühl (5 EUR) kaj Lee (25 EUR).

(en la papera versio: spezokonto kaj bilanco)



(en la papera versio: spezokonto kaj bilanco)

**Novaj (ret)adresoj**

43. YAMASAKI Seikô, Japanio syama(a)qf6.so-net.ne.jp

152. Ilija ANDREEV, ul. Vit N-o 3. ap. 4, BG-9700 Ŝumen, Bulgario, tel. 054-64992, portebla 087-26.42.46

**Novaj membroj**

323. S-ro Remy SPROELANTS, Tumulusstr. 18, B-3583 PAAL-BERINGEN, Belgio, respro(a)wanadoo.be

324. S-ro José PINTO DE SOUZA, Ed. Lacomblé-laan 28, B-1040 BRUSSEL, Belgio

**Mortis en akcidento Gilbert Ledon**

Denove IKEF perdis gravan kaj ageman membron: Gilbert René LEDON (IKEF 177) el Brazilo. Li mortis kune kun sia edzino Symilde (same grava esperantisto) je 3 marto 2003 per aŭtomobila akcidento proksime de sia hejmo en São Paulo. Gilbert Ledon ĉiam estis vigla kaj kritikema, eĉ polemika homo, kiu kuraĝe atakis misfunkciojn kaj mankojn ĉiuloke. Li estis entreprenisto; en sia entrepreno li produktis 'manekenojn' (pupojn por prezenti vestaĵojn en montrofenestroj), kaj pri tio li eĉ eldonis specialajn broŝurojn 'Teknikaj Kajeroj'.

Sed li ankaŭ estis aŭtoro de multaj artikoloj pri ekonomiaj kaj politikaj temoj, tion precipe en la revuo 'Monato'. Al lia agemo apartenis ankaŭ teminara laboro. Li ellaboris kaj redaktis la 'Aviadan Terminaron', aperintan en 2002 en eldonejo Fonto, Chapecó-SC, Brazilo.

Gilbert R. Ledon estis regula vizitanto de Universalaj Kongresoj kaj en tio ankaŭ ĉeestanto en la Ĝenerala Kunsido de IKEF. Ni ĉiam gardos bonan memoron pri li.

**Subtena Fondaĵo**

En la jarraportoj estis menciita la nova subtena fondaĵo. Al tiu fondaĵo dum la pasinta jaro kontribuis s-roj Bakker, Braun, Mee kaj Ohba; por la nuna jaro jam subtenis Braun kaj Könyves. Per ĝi eblis pagi la kotizojn por la jaro 2003 de 6 membroj el nepagipovaj landoj. Pliaj kontribuoj estas bonvenaj!

Franz Josef Braun, Prezidanto



**Kunsidraporto pri KKR**

Okazis kunsido de kongolandaj IKEF-anoj en Kinshasa ĉe Flam-sidejo, sabate la 8-an de marto 2003 de la 12-a ĝis la 16-a horo. La tagordo havis kvar punktojn:
- Unue alĝustigi la celojn de KKR,
- Due precizigi la kampojn de KKR,
- Trie starigi la gvidantaron de KKR,
- Diversaĵoj.

1. Celoj de KKR:
- Membrigi aliajn anojn al IKEF,
- Funkciigi membrokotizojn ene de KKR kaj por IKEF,
- Partoprenigi kongolandajn IKEF-anojn al universalaj kongresoj helpe de IKEF,
- Ĝemeligi kongolandajn esperantistojn kun aliaj pri ekonomia kaj komerca afero.

2. Kampoj:

Jen estas kampoj sur kiuj interesitoj povas komerci, investadi kaj trovi kunlaborantojn:

**2.1. Eksportado:**

- Fabrikado de sukoj (vinoj), fruktogustaj sukoj, arbofoliaj sukoj ekstraktitaj el tropikaj fruktoj.
- Perado pri la aĉeto de lignaĵoj kaj mineroj.

**2.2. Investado :**

- Agrikulturo: arakidoj, maniokoj, sojoj, maizoj, fazeoloj, potatoj...
- Bredado: bovoj, ŝafoj, porkoj, kortobirdaro...

**3.3. Importado:**

Vestaĵoj, nutraĵaj produktoj, elektraj kuiriloj, sunvarmaj kuiriloj, porteblaj telefonoj...

Sufiĉas antaŭanonci sin al ni perpoŝte je : KKR, B.P 761 KINSHASA XI, D.R. KONGO aŭ al retadreso: kkr_cd(a)hotmail.com.

Krome la kongaj IKEF-anoj serĉas rimedojn por ke unu aŭ du membroj povu partopreni ĉi-jaran UK. Tie ili deziras vendi kongajn artaĵojn.

Raportis s-ro MBONSELE MOYAME (flamcd(a)yahoo.fr)
Vickunordiganto de KKR kaj Flam-respondeculo

**Komercaj petoj kaj proponoj**

Ĉinio

**La Dua Translanda aĉet-kunveno** okazos en Xiamen, Fujian-provinco, Ĉinio, de la 9-a ĝis la 11-a de aprilo 2003. Ĉina Ekonomi-Komerca Komitato invitos al la aĉet-kunveno WAL*MART, METRO kaj pli ol cent diverslandajn kompaniojn, ĉenmagazenojn, aĉet-centrojn kaj monopol-vendejojn.

En la aĉetkunvenejo nombriĝos ĉ. 1800 eksponhaloj/ŝrankoj, kiuj estos tute okupitaj pro tio ke ankaŭ multegaj ĉinaj kompanioj kaj ĉenmagazenoj deziras partopreni.

Ĉefaj eksponaĵoj en la aĉetkunvenejo: ĉiutagaj varoj, teksaĵoj, ŝuoj, ĉapoj, ornamaĵoj, donacoj, ludiloj, meti-artaĵoj, manĝaĵoj, trinkaĵoj, elektronikaĵoj, konstrua materialo, uzaĵoj por hejmo, oficejo, sporto k.a.

Huang Ting-sheng, tonlian33(a)163.com (tradukita el ĵurnalo 'Fujian'a Ekonomio')

**Multfunkcia telefono**: 6 $ FOB Ĉinio. Funkcioj:

1. interna kodigilo (encoder) DTMF/FSK,
2. kalkulilo kaj hor-vokado,
3. memori kaj montri la numerojn (80 altelefonajn kaj 30 eltelefonajn),
4. aŭtomata numero por IP-telefono,
5. blua lumado de ekrano dum telefonado,
6. interna kontraŭŝtela telefonado,
7. aliaj funkcioj...

Xi'an Verdstela Komerca Kompanio, Jiang-Gong-Lu 8, CN-710043 Xi'an, Ĉinio; tel: +86-29-2242215, fakso:+86-29-2232952, reto: informo(a)komerco.com, komerco(a)public.xa.sn.cn, esp(a)pub.xaonline.com.



**Ĉina kompanio volas aĉeti eluzitajn rotariajn drilojn** (rotary drilling) italajn aŭ alilandajn por fosi fundamenton de domego. Dir. Ĉielismo (WANG Tianyi), Xi'an Verdstela Komerca Kompanio, Jiang-Gong-Lu 8, CN-710043 Xi'an, Ĉinio; tel: +86-29-2242215, fakso:+86-29-2232952, reto: informo(a)komerco.com, komerco(a)public.xa.sn.cn, esp(a)pub.xaonline.com.

**Mia kompanio ĉefe produktas diversajn kovrilojn de seĝoj kaj sofoj**. Kutime niaj laboristoj, kun tradicia metodo, mane-brodas la kovrilojn per lano-fadeno. Ni iutempe ankaŭ komercas je aliaj aĵoj, ekzemple: tablo-brodaĵoj, tapiŝoj, ĵerzoj, ktp. La aĵoj nun ĉefe estas eksportataj al Egiptio, Saudi-Arabio, Unuiĝintaj Arabaj Emirejoj. Direktoro Wang Cheng-zhi, Yantai-a Verd-Stela Arta Kompanio Limigita, No.89-5-1 Huangshan-str., Yantai, Shandong, Ĉinio, CN-264001, rete: grenstar(a)public.ytptt.sd.cn, tel.: 0086-535-6605088 kaj 0086-535-6170665, fakso: 0086-535-6605088.

**Ĉina fabriko ofertas materialon por produktantoj de brutnutraĵoj**, medikamentoj kaj aliaj:

| | |
|---|---|
| Vitamino B6, seria produkto | Alanine (Aminopropionic Acid) |
| Pyridoxine Hydrochloride | Pyridoxine Dihydrochloride |
| Pyridoxal Hydrochloride | Pyritinol Hydrochloride |
| 5, 4-Methyl-5-Ethoxyoxazole(M.E.O) | Aminopropionitrile |

Prezo: 15 EUR/kg FOB Shanghai. Dir. Ĉielismo (WANG Tianyi), Xi'an Verdstela Komerca Kompanio, Jiang-Gong-Lu 8, CN-710043 Xi'an, Ĉinio, Tel: +86-29-2242215 Fakso: +86-29-2232952 Reto: informo(a)komerco.com, komerco(a)public.xa.sn.cn, esp(a)pub.xaonline.com.

**Por komercistoj de konstrumaterialoj** kaj koncernaj entreprenistoj, mi ofertas emajl-koloriĝan sablon (enamelled sand). Estas novtipa malmola materialo de konstru-kaj ornamad-painto, medioprotekta, bonkvalita kaj abund-kolora, brulo-, akvo- kaj korodorezista, farata en Wuhan, Hubei. Kontaktu: Ji Ding, rete dingjiws(a)yahoo.com (fakdelegito de UEA, v. jarlibron 2002, p. 132).

Tanzanio

Mi estas Ambrose Polle el Tanzanio. Mia onklino volas eksporti lignaĵojn al Francio de Tanzanio. Tial, ŝi serĉas francon aŭ francinon kiu pretos kunlabori kun ŝi. Ŝi estis dungito de nacia asekura korporacio sed nun ŝi ne laboras. Se iu pretos rilati kun ŝi tiu devas scii, ke ŝia kapitalo estas modesta sed iel sufiĉa por la komenco. Ŝi ne kapablas paroli en Esperanto, tamen regas bone la anglan. Ŝia retadreso estas jmalulu(a)hotmail.com. Vi povas senpere kontakti kun ŝi kvankam gravas ankaŭ respondi al mi por ke mi sciu kiel estas via reago tiupete. Ambrose Polle, ambrosefpolle(a)yahoo.com.

Kolombio

Mi reprezentas grandan kompanion kiu produktas subvestojn por virinoj. Mi havas tre bonkvalitan stokon de subvestoj (mamzonoj kaj kalsonetoj) por virinoj. La stoko estas tre bona, laŭmoda kaj alloga kaj la katalogon oni povas vidi per la reto je www.armoni-a.com.co. Se vi interesiĝas, kontaktu min private je rdta(a)softhome.net. Tre amike: Ruben' Torres.

Litovio

Litovia ekonomio en lasta jaro post ioma da rompo komencis kreski alten. Mi posedas kompanion kiu akceptus proponojn kunlabori en turisma kampo (hoteleto, ekskursoj, ripozo en vilaĝo, biciklado tra la pitoreskaj lokoj de Litovio, konstruado de ripozejo apud lago aŭ vilaĝo); agrikulturaj aferoj (kreskado kaj vendado de legomoj, fruktoj, bestbredado); vendo de diversaj varoj (aŭtopartoj, manĝovaroj, ĉiutagaj varoj). Kontaktu: Stasys Kruzinauskas, Vilkaviskis, Litovio; rete kruzinauskas(a)sala.lt aŭ stkruz(a)lrs.lt.

Kamerunio

Mi havas la honoron adresi al vi mian humilan peton:

I.a) Kunlaboro pri agrikulturo: utiligi, ekspluati terenojn kaj starigi plantejojn.

b) Ankaŭ pri turismo. Riĉa kaj urĝa kampo kun kunlaborantoj. Jam ni realigu la programon de la aranĝo de MTK (Monda Turismo en Kamerunio) je 2003/11/6-13. Samtempe mi ĉi-tie invitas turistojn, vizitantojn kaj ekspoziciantojn al tiu gravega, unika kaj historia evento kun ligota ekspozicio.

N.B.: Mi insistus, profitante de tiu oportuneco kaj jen mi troviĝas je mia plej alta



ambicio en la vivo. Ĉu mi ne tiel meritas kuraĝigon kaj gratulon pro mia kuraĝego de hometo ne evoluinta ? Plie estas por propagandi nian aferon kaj la popularecon de Esperanto tra la nacioj. Do ĝenerala kaj escepta kazo. Permesu al mi tion ĉi sekvantan. T.e. kun aŭ ne kunlaboranto mi petegas monhelpon per sumegoj da ĝi, ebligantan okazigi vere elokvente nian eventon en Kamerunio (vidu la amplekson de la programo jam komunikita). Necesus ankaŭ materialo kaj organizadsistemo, ĉar ĝis 10.000 partoprenantoj venu viziti, koni, malkovri la miniaturon de Afriko, la kuriozan Kamerunion kun ĝiaj profundeco kaj riĉa diverseco lingva (pli ol 260 apud fremdaj kaj la du oficialaj franca kaj angla) mora, tradicia, folklora, kuira, sporta, kultura, klimata, geografia, ideologia, arta, religia, ekonomia.

II Mono

Por tajpigi kaj publikigi miam delonge pretan manuskripton de pli ol 610 paĝoj (france) pri la 3-a jarmilo kaj pri la nuna homo. Ĝi titoliĝas 'le bréviaire de l'homme du 3è millénaire'.

III Fine: ĉu mi povus ricevi industriajn kvantojn da fiŝoj frostigitaj kaj vivaj ?

Sinceran antaŭdankon, Jean-Marie MBOLE MBELE, B.P. 1816 Douala-Cameroun, fakso: (237) 342.77.03, rete j_mboge(a)yahoo.com.

Vietnamio

Ni estas azia moda kompanio. Ni produktas kaj komercas modajn vestojn, kemiaĵojn kaj komposit-plaston. Nia kompanio volonte helpas diverslandajn esperantistojn, kiuj dezirus investi en aŭ vojaĝi al Vjetnamio. Ni esperas baldaŭ ricevi interesiĝon de esperantistoj en la mondo. Bonvole turnu vin al: Nguyen Thi Thanh Van, retadreso tvan7874(a)yahoo.com, Ho Chi Minh, Vjetnamio;

**www.gxangalo.com**

Ĝangalo estas reta novaĵservo kiu ĉiutage aperigas aktualajn informojn. Ĝi estas kvazaŭ kompletigo de la revuo Monato, en kiu aperu pli longaj kaj pri pripensitaj artikoloj, malpli ligitaj al aktualeco. Kontribuoj de IKEF-membroj el la tuta mondo pri ekonomio kaj similaj temoj estas bonvenaj!

**IKEF en Vidipedio**

En 'Vikipedio', projekto por interreta, multlingva enciklopedio, jam estas IKEF-mencio je http://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Komerca_kaj_Ekonomia_Fakgrupo. Ankoraŭ restas ligoj al 'malplenaj' artikoloj. Se vi klakas ligilon kiu ne havas artikolon, vi ankaŭ povas skribi artikolon pri tio. Kiuj IKEF-anoj kompletigos kaj verkos artikolojn por Vikipedio pri Ekonomio? rr

**Vidbendo kun intervjuo de profesoro Selten**

Baldaŭ estos je dispono kelkaj pliaj ekzempleroj de la vidbendo por pruntedono. Interesitoj kontaktu la prezidanton je f.j.braun(a)t-online.de.

**Franĉizo**

En antaŭaj numeroj de La Merkato aperis artikoletoj pri la signifo de 'franĉizo'. Post redaktofino de ĉi tiu numero alvenis resumo de la ricevitaj reagoj. Ili aperos en la .pdf-versio de la revuo, je www.ikef.org.

La internacia scienc-praktika seminario 'Utiligo de Esperanto en komerco, turismo kaj interhomaj rilatoj' estas antaŭvidita je 9-11 oktobro 2003.

Por informoj kontaktu: Dimitar Papazov, Prezidanto de Centro 'Espero', pk 94, 1373 SOFIO, Bulgario, telefakso: 987 38 47, rete: centroespero(a)hotmail.com.

Pli da informoj aperos en venonta La Merkato.